



# Protokolo

## Komitatkunvenoj de TEJO

Julio 2022

### 1-a sesio, sabaton 23-an de julio 10:00-12:00 UTC

Protokolas: Wojtek

[Antaŭ malfermo: [Kontrolado de ĉeestantoj](#)]

#### 1. Malfermo

- Klarigo de proceduroj

*Komence ĝenerala sekretario kontrolas liston de komitatanoj (alirebla sub supra ligilo) kaj konfirmas, ke nombro de la ĉeestantoj sufiĉas por kvorumo. Kunsidestro (Kirill - elektita antaŭ la kunsido) bonvenigas ĉiujn partoprenantojn, informas pri teĥnikaĵoj kaj proceduroj.*

- Elektro de propona teamo

*Por la propona komisiono kandidatiĝas du personoj - Michael Boris (MB) kaj Oscar, kiuj konfirmas sian disponeblon. Oscar estis jam elektita antaŭ la komenco de kunsido. Sekvas voĉdonado pri aprobo de MB - la rezulto videblas sube:*

### Propono 1

Poll | 1 question | 24 of 27 (88%) participated

1. La Komitato elektas Michael Boris Mandirola kiel membro de la propona teamo. (Single Choice) \*

24/24 (100%) answered

Jes (24/24) 100%

Ne (0/24) 0%



## 2. Tagordo

- o Fikso de cetera tagordo

Ĝenerala Sekretario prezentas la tagordon ([alirebla en aparta dokumento](#)).


MB proponas amendon: aldoni tagorderon pri organizo de JES 2022/23, pridiskutotan antaŭ la tagordoero pri la nova buĝeto.

Li ankaŭ proponas la duan temon por diskuti - la kalkulado de komitatanoj de fakaj sekcioj de TEJO, por preparoli post la tagordero pri novaĵoj de CO.

Hans Backlin proponas aldoni la tagordenon pri la Revuo Kontakto kaj ĝia eksterordinara malfruo post la proponitaj tagorderoj de MB.

Albert proponas aldoni eron pri bonvenigo de Indonezia LS en TEJO rekte post la fikso de la cetera tagordo.

La propona teamo kolektas proponojn kaj kundividas ilin en la babilejo; helpantoj pretigas la zoom-voĉdonadon. Post unuminuta voĉdonado venas rezultoj:



Kunsidestro resumas la voĉdonadon kaj akceptas proponojn laŭ supraj rezultoj. Proponoj estas aldonataj al la tagordo (dosiero kun fina versio de la tagordo alireblas per la sama ligilo supre).

- o Bonvenigo de IEJO

Kunsidestro petas Albert preni voĉon. Albert formale bonvenigas IEJO en aro de Landaj Sekcioj de TEJO. Li aparte bonvenigas en aro de komitatanoj la plej novan komitatano - Syauiq Styta Lacksana de Indonezio. Syaui dankas pro la akcepto kaj esprimas esperon por



*fruktodona kunlaboro.*

*Albert petas ebligi al li kundividi ekranon kaj montri la bonvenigan filmeton preparitan de TEJO-komunumo speciale por tiu ĉi okazo (la ligilo por spekti aperos baldaŭ).*

*Patricio gratulas kaj dankas al reprezentanto de ĵus akceptita sekcio.*

### 3. Ĝisdatigoj el komisionoj

*Kunsidestro Kirill transiras al ĝisdatigoj kaj petas respondeculojn preni voĉon.*

- o Projektoj/Subvencioj

Raportas **Léon**: progreso estas regule komunikata retpoŝte. Ekzistas kelkaj ĉefaj fontoj de subvencioj.

Kadre de la EU-programo Erasmus+: organizita estos la projekto pri kreado de muzikalo, kiu engaĝigos 32 personojn kaj plene kovros elspezojn de ĝia organizado. La muzikalo mem premieros dum ĉi-jara IJK.

De la dua EU-programo pri volontulado "ESK": la volontula projekto daŭrigos ankaŭ venontjare. Novaj volontuloj jam estas elektitaj (Jeanne, Manu kaj Jonas) - la varbado finiĝis kaj laŭplane ĉio iros pli flue ol antaŭe. Aplikita novaĵo por pli efika mastrumado de volontuloj estas, ke nun novaj volontuloj havos sian preferan fakon de agado, kiun ili elektis dum la elekta procezo.

Jeanne koncentriĝos sur komunikado (transprenita post ĝisnune dungita Ariel), Manu - kunlaboros en projekta teamo pri subvencioj; Jonas pro liaj spertoj kaj kapabloj respondecos pri IT-aferoj.

Alia fonto de financado estas projektoj de Konsilio de Eŭropo: okazis la trejnado "Trejnu novajn Trejnistojn" kunlabore kun JEFO; okazos ankaŭ du trejnadaj dum IJK en Nederlando (pri inkluziveco kaj "lingvoj por demokracio") kio ebligos multe malplikoste partopreni en la tuta evento por 40 partoprenantoj. La problemo de malsukcesa peto por administra subvencio de KdE estos priskribita de kasisto, dum la diskuto pri buĝeto.

Léon mencias ke antaŭ nelonge aperis ŝanco por subvencipeti de nova fonto: ESF (Esperantic Studies Foundation) - por replenigi truon en buĝeto, kun subteno de UEA.

Li mallonge priskribas planojn por subvencipetado por aŭtunaj limdatoj: denove submetita administra subvencio kaj aliaj projektoj de KdE, junularaj interŝanĝoj de Erasmus+ - la plano estas kreskigi kvanton de projektoj entute.

Je la fino, Léon mencias pri multaj organizaj malfacilaĵoj pro pandemio dum lastaj du jaroj.

**Patricio** substrekas ke laŭeble volontuloj ne plene anstataŭu dungiton pri komunikado.

- o Aktivula Trejnado

Raportas **Inès**: antaŭ kelkaj semajnoj okazis trejnado por novaj trejnistoj, en suda Francio, kunlabore kun JEFO. Ŝi estis kunordiganto de trejnistoj kaj ĉeforganizanto de la tuta projekto; rezulte trejnistiĝis 10 novaj brilaj trejnistoj.



Organizitaj antaŭ nelonge estis ankaŭ du trejnadoj por novaj komitatanoj. Ŝi organizas renkontiĝon de TEJO-trejnistoj dum IJK kaj sukcese varbis trejnistojn por du IJK-seminarioj. Ŝi informas, ke la subvencio por organizado de trejnado de trejnistoj en 2023 ne estis ricevita. Ŝi markas, ke baldaŭ bezonata estos nova respondeculo pri aktivula trejnado kaj ŝi esperas je sperto kaj volo de David.

**Léon** aldonas ke postenoj de trejnistoj varbataj por la Erasmus+/KdE-trejnadoj estas ĉiam pagataj.

- Eksteraj Rilatoj

Raportas **Valentin**, laŭ koncernaj kampoj de agado. Ĉe Konsilio de Eŭropo, reprezentanto en konsilkonsilio pri junularo estas Tuška - ŝi komencis sian mandaton antaŭ kelkaj monatoj kaj aktivas tie. Valentin reprezentadis TEJO-n ĉe kunsidoj de FoJE (Youth Forum Jeunesse). Li informas, ke la plej grava atingo de la pasanta mandato estas la nova dokumento pri lingvopolitikaj pozicioj de TEJO. Laboro preskaŭ finiĝis kaj ĝi nun estas provlegata, venontsemajne estos sendita oficiale al la komitato, tiam eblos aldoni amendojn. La dokumento fine estos pri diskutata dum IJK kaj akceptita per voĉdonado dum la ĉeesta komitatkunsido.

Fine Valentin mencias, ke dum IJK okazos ankaŭ la trejnado pri eksteraj rilatoj kaj kunsido de la komisiono - ambaŭ malfermaj por ĉiuj, troveblaj en IJK-programo.

- Edukado, Scienco, Kulturo

Raportas **Albert**, kiu respondecas pri tiuj ĉi fakoj kune kun kun Tobiaŝ.

Li rakontas, ke baza kunlaboro kun UEA kaj ILEI progresas: en majo okazis triflanka kunsido pri edukado. Sciencaj prelegoj aperas ĉiumonate, mastrumas ilin Senehaja, la sekva okazos post semajno, de aktivulo de nova Indonezia landa sekcio. Komencis agadon novaj grupoj ĉe universitatoj en Brazilo kaj Katalunio. Usona MIT-universitato ofertas novan pagatan programon de studoj pri planlingvoj. Tobiaŝ raportas pri kultura fako: progresas preparado de la muzikalo, kiu estas tre ampleksa entrepreno kaj engaĝigas multajn homfortojn. Okazos ankaŭ aliaj du kulturaj programeroj dum IJK: pri literaturo (de Hanso) kaj tradukado (de li mem) - videblas en la programo de la evento.

**Snehaja** komentas, ke ŝi bezonashelpo por organizi ĉiumonatajn sciencajn prelegojn.

- Talento

**Léon** klarigas, ke li ne respondecas pri ĉi tiu fako, sed la respondeculo - Nickson - havis akcidenton kaj ankoraŭ ne resaniĝis kaj ne plene revenis al kutima aktiveco; neniu alia dume prizorgis tiun kampon.

Patricio dankas pro ekspliko kaj honesteco de Léon.

- Landa kaj Faka Agado

Raportas **Albert**: post longa malfruo aperis KODEJO 2020 (trovebla ĉe TEJO-retpaĝo) kaj fine de majo komenciĝis kolektado de datumoj por KODEJO 2021 - la laboroj progresas, respondis entute 21 sekcioj de TEJO.

Organizitaj estis kontinentaj junularaj konferencoj de Amerikoj kaj Azio - okazis multaj kaj diversaj prelegoj, debatoj pri kunlaboro kaj prezentoj de TEJO-komisionoj.



Nun Albert klopodas pri organizado de Junulara Movada Foiro - por ebligi sinprezenti al ĉiuj organizoj kaj sekcioj de la movado. Okazis sinprezentadoj de LS de Katalunio kaj Francio dum pasintaj eventoj (Kataluna kongreso kaj trejnado por novaj trejnistoj respektive).

Venas ankaŭ signoj pri lanĉo de novaj LS de Finnlando kaj Japanio. Daŭre pritraktata estas aliĝprocezo de LS de Senegalio kaj faka sekcio de Vikimedio Esperanto. Daŭras penoj revivigi LSn de Hispanio, DR Kongo kaj Litovio.

- Kongresoj

Resumas **Roĉjo**: en estraro nuntempe ne estas unu respondeculo pri kongresoj, sed li raportas nun kiel organizanto de ĉi-jara. La preparadoj al IJK en Nederlando iras bone kaj li kalkulas je aliĝo de ĉeestantoj kiuj ankoraŭ ne aliĝis.

IJK 2023 okazos en Italio, kune kun jarkongreso de ILEI - la propono de Italioj estis akceptita ĉar venis neniu alia konsiderinda propono. Aperis problemo kun antaŭe elektita ejo kaj eventuale ĝi devis esti ŝanĝita - finfine ĝi okazos oriente de Venecio surmare, kie IJF iam pasintec okazis. Kongresa komisiono ankoraŭ ne estas plene kreita - bezonatas homoj, precipe Italioj (nun komisiitoj estas Bruĉjo kaj Karlos').

Rilate al Retoso: aperis ideo okazigi ĝin aŭtune (post septembro), sed krome okazos VK fine de novembro, do eble ambaŭ eventoj estos kunigitaj - tio ankoraŭ ne estas decidita.

- Informado

Daŭrigas **Roĉjo** - informado estas la kampo de Tyron, sed pro lia nedisponeblo li anstataŭe ankaŭ rakontas pri tri ĉefaj zorgoj:

- anstataŭigo de Ariel: li finas kontrakton ĉi-monate sed pro financaj kialoj oni decidis ne - laŭplane teamo de volontuloj daŭrigos la agadon je tiu ĉi kampo.
- Revuo Kontakto: ĉiuj konscias pri la malfacila situacio kaj la ĉefredaktoro laboregas por malgrandigi la malfruon, sed li bedaŭrinde ne havas pli detalajn novaĵojn;
- nova retpaĝo: ĝi plej verŝajne kreiĝos dum venonta mandato, ĝi uzos la saman nune lanĉatan AKSO-sistemon; laboro pri ĝia enhavo okazos dum venonta mandato.

- Financoj

Mallonge raportas **Veronika**, dirante, ke multe estis resumite de Léon pri projektoj kaj la plej grava fokuso estos la diskuto pri la nova, reviziita buĝeto dum la sekva sesio. Ŝi substrekas, ke mankas homoj en la interesgrupo pri financoj, ĉar la nuna financa teamo konsistas nur el aliaj stabanoj.

## 4. Prezento de la kandidatoj por la Estraro

- Resumo raporto de Elekta Komisiono

**Hanso** koncize priskribas la situacion: estas precize 9 kandidatoj, la plena raporto de elekta komisiono legeblas [ĉi tie](#); por multaj postenoj estas nur unu kandidato kaj elekto estos nur por kasisto kaj vicprezidantoj.

Li indikas, ke pro tagorda malfruo li ne resumos raporton denove, sed ajnaj demandoj de komitatanoj bonvenas - preskaŭ ĉiuj kandidatoj ĉeestas do oni povas aŭdi respondon rekte



de koncernitaj personoj.

**MB** starigas demandon al elekta komisiono: kial ĝi ne rekomendas 3 vicprezidantojn kaj la duan al du kandidatoj por kasistoj pri kiaj estas iliaj planoj por resanigo de organizaj financoj.

**Hanso** respondas: kutime en TEJO oni preferas vicprezidantojn kiuj jam estis en estraro kaj havas la sperton.

**Patricio** dankas pro demando al li kaj respondas ke li antaŭe kunsidis kun alia kandidato por financa fako kaj ili interkonsentis ke ili ĉiukaze pretas kunlabori; li planas modifi la strukturon de financa teamo kaj klopodos daŭrigi nunajn kontraktojn de dungitoj.

**Wilson** konfirmas helpon pri librotenado ĉar li havas sperton en tiu kampo; li konfesas ke li volis kandidatiĝi kiel senpostena estrarano sed elekta komisiono konvinkis lin kandidatiĝi por financa posteno.

- Prezento de kandidato(j)

**Ana:** la elekta komisiono konsciis pri akcidento de Nickson, ili akceptis lian kandidatiĝon kaj konsultis lian estontecan aktivecon - li espereble plibonfartos dum venontaj du monatoj kaj revenos al normala agado komence de la venonta mandato.

**Vít** demandas Elektan Komisionon: ĉu iu volis estri dujare.

**Hanso** respondas, ke neniu, kaj espereble iu uzos tiun oportunun venontjare.

- Voĉdonado pri kvantoj da estraranoj kaj vicprezidantoj

Ĉeestantoj diskutas kaj esprimas siajn opiniojn pri eblaj variantoj.

**Roĉjo** subtenas 9-kapan estraron pro kvanto de kampoj de respondeco kaj antaŭaj spertoj montras ke ĉiam aktiveco de iuj estraranoj malkreskas kaj malaperas dum tempo.

**Albert** ankaŭ poras 9-personan konsiston de estraro kaj 2 vicprezidantojn. **Patricio** opinias same, tamen li preferus elekti 3 vicprezidantojn.

**Albert** demandas ĉu du kandidatoj kiuj malĉeestas estis informitaj ke ili devas aperi en la kunsido.

**Hanso** informas ke efektive jes, kaj nur unu el ili ne ĉeestas (David). **MB** klarigas ke David ja kontribuis al organizado de ĉi-komitatkunsido, sed bedaŭrinde ne povis ĉeesti pro gravaj personaj kialoj. **Ana** aldonas ke li informis anticipe ke li ne povos partopreni, sed espereble li ĉeestos dum dua sesio hodiaŭ. **Inès** subtenas lian kandidatiĝon pro lia agado en kampo de aktivula trejando.

Kunsidestro **Kirill** petas proponan komisionon formi la voĉdonadon kaj helpantojn starti ĝin. La rezultoj prezentiĝas kiel sube:




## Propono pri nombro de estraranoj kaj vp-j

Poll | 1 question | 28 of 30 (93%) participated

1. La Komitato de TEJO decidis voĉdoni rete pri kvantoj da estraranoj kaj vicprezidantoj samtempe kun la elekto de Prezidanto, Kasisto kaj Ĝenerala Sekretario. (Single Choice) \*

28/28 (100%) answered



Post prezento de la rezultoj kunsidestro fermas la sesion je la 12:07 UTC.





## 2-a sesio, sabaton 23-an de julio 14:00-16:00 UTC

*Protokolas:* Lenka

La dua sesio komenciĝas je la 14.00 UTC kun kontrolado de ĉeestantoj. **Kirill** rebonvenigas ĉiujn kaj demandas, ĉu estas plia amendpropono.

**Roĉjo** respondas jese, ke ĝi temas pri elekta komisiono.

**MB** ankaŭ proponas alian - Rezulto de unuaj voĉdonoj kaj elekto de vicprezidantoj.

Okazas voĉdonado pri aldono de tagordero "Elektoj" - pri rezultoj, vicprezidantoj kaj elekta komisiono. Bezonatas du trionoj por aldoni la tagorderon.


Elektoj

### Elektoj

Poll ended | 1 question | 20 of 21 (95%) participated

1. La Komitato de TEJO aldonas tagorderon "Elektoj" komence de la dua sesio. (Single Choice) \*

20/20 (100%) answered



... [Share Results](#)

Tagordero estas aldonita al la tagordo.

1. Elektoj
  - a. Anonco de rezultoj

Prezentado kaj komentado de rezultoj de voĉdonado, kiu okazis inter la unua kaj dua sesioj.





**Roĉjo** anoncas la rezultojn: Estas decidita, ke la Estraro estos 9-kapa, havos 2 vicprezidantojn, prezidanto kaj ĝenerala sekretario ricevis pli ol duonon de voĉoj, Wilson iĝos nova kasisto.

## b. Elekto de vicprezidantoj

**Roĉjo** planis fari voĉdonadojn tuj post la fino de tiu ĉi sesio, li demandas, ĉu iu kontraŭas. **MB** proponas ŝovi la elekton pro malfrua alveno de unu el la kandidatoj kaj unue pridemandadi kandidatojn, ĉar estas 3 kandidatoj por 2 lokoj. **Hans** ne konsentas, ĉar laŭ li ne estus juste pro (ne)preteco kaj (ne)anonco de neĉeesto de la kandidatoj. La kandidatoj jam havis ŝancon prezenti kaj aliaj povis starigi demandojn al ili.

Voĉdonado okazos laŭ planita tagordo:

16:00-06:00: Vicprezidantoj

06:00-12:00: Ceteraj estraranoj

**Hans** petas plilongigon kaj ĉiuj konsentas kun 4 horoj pli por voĉdonado pro horzonoj ĉirkaŭ la mondo, kaj **Roĉjo** plilongigas la lastan ĝis 16:00. **MB** rimarkigas la eblecon voĉdoni pri la ordo de la vicprezidantoj - kiu estos 1-a, kiu 2-a vicprezidanto. **Manuela** rimarkigas, ke eble iu maltrafis kaj ne rimarkis voĉdonadon, ĉar la voĉdonado en la Centra Reto alvenis malfrue. Ŝi zorgas pri tio, ke tiuj, kiuj ne voĉdonis, ne estu eksciigitaj pro nevoĉdonado. **Roĉjo** klarigas, ke li konsideras ĉiujn nunajn voĉdonojn kiel parton de KoKu, **Manuela** ne konsentas, ili laŭ ŝi estas eksteraj.

Oni decidis, ke elekto de la Elekta komisiono devus esti pritraktita post elekto de la estraro. **Roĉjo** proponas tri eblecojn, kiam prizorgi tion. **MB** preferus lasi pli da tempo por pripensi kandidatiĝojn (por EK) kaj elekti dum IJK. **Patricio** konsentas, ĉar verŝajne pli da homoj kandidatiĝos, sed ankaŭ indus, ke ĝi okazu rete pro homoj, kiuj ne ĉeestos IJK. **Roĉjo** proponas neoficialan voĉdonadon pri tio (levitaj manoj), ĉu elekti rete aŭ dum IJK), rezultoj estas egalaj. **Hans** diras, ke eĉ se elekto estos dum IJK, jam nun eblas preparoli la kandidatojn. Li proponas nun neformale menciigi nomojn, kaj ke la formala elekto okazu poste. **MB** rimarkigas ŝanĝojn - ke eĉ neĉeestantoj povos partopreni la voĉdonadon.

## 2. JES 2022/23 - Relanĉo de la diskuto en la estraro

**MB** parolas pri lastaj jaroj, kiam JES ne estis organizitaj pro pandemio. Li komprenas, ke homoj eble ne volas organizi ĝin ĉi jare pro ĝia ebla nuligo (pro pandemio). Li proponas, ke TEJO bone pripensu kaj eble iom risku (ebla gajno aŭ malgajno de mono). Li scivolemas pri opinioj de aliaj. **Hans** persone ŝatas la eventon, sed laŭ li ĝi estas ĉefe eŭropa evento. TEJO tro multe fokusiĝas pri Eŭropaj eventoj kaj subvencioj. Se TEJO respondecos pri alia evento, ĝi devus okazi ekster Eŭropo pro ekvilibro inter kontinentoj. Li ne poras tiun meciitan financon riskon. **Patricio** parolas pri malplifortiĝoj kaj plifortiĝoj de landaj sekcioj kaj de TEJO. La situacio ŝanĝiĝis - landaj sekcioj malplifortiĝis kaj TEJO fortiĝis, do havus sencon ke TEJO organizus ĝin, sed li konsentas, ke TEJO estas tre Eŭropa. **Karlos** diras, ke JES simple estas



granda junulara evento, ni ne pensu, ĉu eŭropa aŭ ne. Disvastigado de esperantistoj ne estas egala en Eŭropo kaj ekz. Azio. Li rimarkigas ke antaŭaj parolantoj parolis tre abstrakte kaj petas klarigojn. Li ne vidas la financon riskon. **Hans** malkonsentas - temas pri du eŭropaj landaj sekcioj (PEJ kaj GEJ) de TEJO, kiuj ne plu povas aŭ volas organizi JES. Li ne opinias, ke TEJO devus organizi iuan ajn eventon, kiu subtenas malegalecon de Eŭropo/neEŭropo. Iu alia devus transpreni la okazadon, ne TEJO. Li tre bone konas la buĝeton. **Karlos** dankas pro la klarigo kaj demandas pri eventuala evento en Ameriko - ĉu Hans subtenus ĝin? **Hans** diras, ke tio komencus ekvilibron de eŭropanoj kaj neeŭropanoj. Eŭropanoj vojaĝas al eventoj tre facile kaj malmultekoste. Se TEJO organizos eventon, faru tion ekster Eŭropo. **Patricio** petas opiniojn de Léon kaj Veronika pri financoj. **Ana R.** parolas pri konservemo de germana registaro (daŭre devigaj maskoj en Germanio), ankaŭ pro tio la germana junularo ne volas okazigi ĝin, sed ili bonvenigus, se iu alia grupo aŭ sekcio okazigus ĝin. Ili ne volas, ke la evento mortu. Ŝi informas, ke GEJ nun fokusiĝas al regionaj eventoj kiel KEKSO, GEJ semajnfino kaj invitas ĉiujn partopreni. **Veronika** kontraŭas okazigadon de JES de TEJO. Ne estus respondece okazigi ĝin kaj riski. Ŝi mencias la pandemion, eblan grandan perdon de mono kaj ankaŭ la fakton, ke nun mankas organiza teamo - homaj fortoj. Por okazigi la eventon, teamo jam devus esti preta almenaŭ 6 monatojn antaŭe. Ŝi ankaŭ mencias, ke ne bonas kaj tre malfacilas, ke unu organiza teamo okazigus du grandajn eventojn proksime unu la alian. (JEFO kaj GEJ jam organizas lokan eventon.)

### 3. Nova buĝeto

**Veronika** petas kundividon de sia ekrano kaj montras dokumenton, kiu estas alirebla [ĉi tie](#). Ŝi ĉion komentas kaj klarigas ŝanĝojn - originalajn kaj reviziitajn monsumojn.

- Ĉio pri volontulado estas fiksita, nur eblas ŝpari pri vojaĝado al eventoj., kaj ne plu bezonatas plibonigado de Voldom-ekipaĵo.
- Nedungo de anstataŭgitanato de Ariel, ĉiuj aliaj dungitoj restos.
- Kunlaborado kun UEA kaj AKSO.
- Aktualaj datoj pri membrokotizoj.
- Malplialtigado de kostoj de la Estraro, ŝparado de multe da mono dank al loĝigo kaj manĝoj dum ĉeesta EsKu en Prago. Planata ĉeesta transdona EsKu en Roterdamo. Parto de vojaĝoj estos repagitaj per IJK projektoj. Ankaŭ retaj EsKu sufiĉe bone funkcias kaj ĉeestaj EsKu ne nepras.
- Kontakto
- IJK - dume vendi jam faritajn varojn, ne krei novan.
- Uzo de donaco de 2020 - subteno por partoprenoj en IJK
- Oni atendas ĝeneralan malprofiton, sed ne tre grandan.

Demandoj:

**Ana** komentas merkatikan parton, ĉefe anoncojn en FB, ŝi pretas donaci monon al TEJO kaj scias pri alia eblo kiel gajni monon.

**Hans** demandas - ĉu dungo de Clément estas parto de la volontula buĝeto?



- **Veronika** respondas, ke la buĝetero daŭre estas en pluso (inkl. EKC mono), Clément ne nur zorgas pri volontuloj, sed ankaŭ havas aliajn taskojn. Buĝeto ne plene kovras la salajron, sed indas daŭrigi. Ŝi konfesas, ke Estraro ne priparolis tion, ĉar ili atendas respondon de ESF kaj daŭre estus aliaj ebloj - UEA pretas helpi al TEJO.

Kion oni forigus unue, se de ESF ne venos sufiĉe multe da mono?

- Pri EKC ne estas ŝanĝoj - estos kvara volontulo.

**MB** informas, ke EKC-volontulo, kiu devintus volontuli en Roterdamo ekde septembro, rezignis, kaj oni ne trovis anstataŭganton. Ĉu tio influas la buĝeton?

- La ĉambro estos okupata de Clément kaj la sumo ne ŝanĝiĝos.

Pri nuligo de varoj (ekz. ĉemizoj) - ĉu oni gajnos per tio, kio restis?

- Oni ne volas teni la stokon sed malplenigi ĝin, ankaŭ pro translokiĝo de CO.

**Léon** aldonas informojn pri ESF - longa kunsido kun UEA, pri financoj, perdo, travivo de la jaro, sukcesa ŝparo en lasta jaro. UEA pretas kunlabori kaj helpi. Ne temos nur pri ESF, sed ankaŭ pri ankoraŭ ne publikaj aferoj. Al la temo pri Volontula domo li aldonas, ke lastjare estis kolizio de la ĉambroj, kaj konfirmas, ke TEJO nun ne havos volontulon de EKC.

**Patricio** dankas al ĉiuj kaj gratulas al Veronika pro ŝia laboro. Li mencias aliajn eblajn malgrandajn gajnojn. Li ne ŝatas la buĝeteron pri neantaŭvidintaj elspezoj kaj komentas nefiksajn kontraktojn de KER oficistoj. Oni devas pripensi, ke ne taŭgas nefiksaj kontraktoj pro nuna neordinara situacio.

- La buĝeto estis pretigita en novembro kaj ekde tiam la situacio ŝanĝiĝis.

**Hans** dankas pro la klarigoj, li daŭre skeptikas pri la elspezoj. Se estas duboj, li proponas malpli da dungoj, li ne subtenus ilin.

- Estraro priparolos tion.

**MB** demandas pri tio, kiel okazis, ke sumo de elspezoj altiĝas ekde la komenco?

- Dum la revizoj ŝi metis pli realismajn sumojn. Alia kialo estas aŭtomataj altiĝoj de salajroj de dungitoj de konkretaj landoj.

Estas proponita voĉdonado pri la buĝeto.

**Hans** bezonas respondon, ĉu Estraro kredas je tiu gajno de 35 000 eŭr de ESF. Se ne li voĉdonos kontraŭ la buĝeto. **Patricio** diras, ke bezonatas unue bone tralegi la dokumenton de buĝeto kaj poste voĉdoni. **Veronika** konsentas. Voĉdonado ne okazas.

## 4. Novaĵoj pri CO

**Léon** diras, ke ne estas tiom multe da novaĵoj kaj supozas, ke homoj ĝenerale konas la situacion, ĉar ĝi estas ofte priparolata. La vendo de la CO por TEJO signifas, ke la adreso restas en Roterdamo, translokiĝos al Volontula Domo. Sube estas loko, kiun oni antaŭe luigis, kaj nun oni investos en ĝin kaj faros tie oficejon por TEJO kaj oficistojn de UEA. Okazos diskuto dum UK, do Hanso poste informos pri la rezultoj. Ili tute honeste informis estontajn estraranojn kaj volontulojn pri tiaj ŝanĝoj kaj eblaj problemoj, sed laŭ planoj TEJO ne bezonos multe da spaco por dokumentoj k. s. Ekzemple revuo Kontakto estas arĥivigita, ciferegita kaj atingebla rete.



## 5. Komitatanoj de fakaj sekcioj - Priparolo kiel okazas la kalkulado de membroj kaj nomumo de komitatano A de fakaj sekcioj

**MB** diras, ke multaj partoprenis diskutojn pri kalkuleblaj membroj. Ne ĉio iris glate - bezonatas pripensi, ĉu la ŝanĝoj pri kalkuleblaj kaj individuaj membroj estas trafaj. Fakaj sekcioj ne havas difinitajn teritoriojn. Eurokka ankoraŭ ne nomumis komitatanon. Li volas aŭdi vidpunktojn de aliaj. Ni pripensu, kiel plibonigi la procedon por ke ĝi estu pli komforta por reprezentantoj de fakaj sekcioj.

**Roĉjo** informas, ke Eurokka fine nomumis komitatanon. Ili ne havis kalkuleblajn membrojn unue, sed post interkonsento oni trovis kalkuleblajn membrojn.. BEMI tute ne kontaktis TEJOn.

Roĉjo opinias, ke pli facilas starigi fakan ol landan sekcion. Landa havas limigitan teritorion. Ni certigu, ke faka sekcio estu aktiva kaj havu iun membron por reprezenti en TEJO. Indas pliklarigi la procezon, havi iun planon. KODEJo estu preta pli frue ol pasinteco.

**Kubof** komentas situacion de Eurokka kaj sia rolo en TEJO. Ene de Eurokka okazis diskuto, kiu ankoraŭ ne finiĝis kaj pro tio estas tiuj malfruoj pri kvanto de membroj, ili enordigos ĉion baldaŭ. Li mencias sendadon de kontaktoj de membroj rekte al TEJO.

**MB** demandas al Roĉjo, ĉu li volas plibonigi, krei grupon pri tiu temo? **Roĉjo** dubas, ke ili atingus alian rezulton. Li preparolos kun Tobiaŝ regulojn, interesgrupo. Ne ŝanĝi proceduron, sed **Roĉjo** ne plu estos ĝenerala sekretario. Tobiaŝ estos bonvena tion fari.

**Tobiaŝ** ne havas fortan opinionon, sed li estas malfermita, eĉ por neformalaj diskutoj dum IJK.

## 6. Kontakto - Diskutado pri ĝia eksterordinara malfruo

**Hans**, kiu proponis tiun tagordon, estas konsternita pri la malfruego. Kontakto estas sola konkretaĵo por varbado de novaj esperantistoj - mankas kialo memriĝi en TEJO, se Kontakto ne eldoniĝas. Duonjaro forpasis, neniuj ĉijara numero estas eldonita. Eble homoj rezignos pri TEJO pro tio. Li pledas pri baldaŭa solvo de tio.

**Patricio** konsentas, ke la rolo de Kontakto estas kerna kaj forta parto de kultura vivo de Esperanto. Ĉu fari kampanjon por pli da artikoloj aŭ ĉu mankas mono aŭ kio okazas?

## 7. Reglamentaj ŝanĝoj

**Roĉjo** diras, ke neniuj sendis proponon por preparoli.

## 8. Ceteraĵoj

**MB** memorigas, ke en EKC eblas volontuli, liberiĝis unu loko.



**Albert** anoncas Junularan Movadan Foiron en IJK, kuraĝigas peti tablon kaj varbi tie por sia organizo. Li ankaŭ denove proponas kontakti homojn de eksteresperantajn organizojn ka paroprenigi ilin. Li mencias moralan devon de novaj komitatanoj membriĝi en iu komisiono de TEJO.

**Valentin** dankas al ĉiuj komitatanoj. Li mencias dokumenton pri LPP, estos sendita malneto por amendi ĝin ĝis IJK. Ĉio estos pridiskutita dum KoKu en IJK.

**Albert** petas komitatanojn sendi statutojn kaj dokumentojn de siaj landaj sekcioj, por ke TEJO konservu ilin. TEJO kolektos dokumentojn, ke ili estu troveblaj kaj disponeblaj por estonteco. Li petas almenaŭ neformalajn respondojn de komitatanoj.

Patricio dankas al ĉiuj kaj kuriĝigas esti aktivaj.

## 9. Fermo

Kirill dankas al ĉiuj kaj post komuna foto fermas la sesion je 15.49 UTC.